

# Eŭropa Bulteno

---

Novembro 2018, Numero 186

---

## LABORPLANO DE EEU POR 2019

Per la koresponda kunsido de la estraranoj en novembro 2018 baze de la propono de la sekretario Zlatko Tišljar estis akceptita la orientiga Laborplano de EEU por la jaro 2019, kiun ni prezentas ĉi-sube.

La tuteŭropa membraro rajtas kontribui per rimarkoj kaj proponoj. Faru tion ĝis la fino de decembro konsiderante la realajn financajn kaj personarajn kapacitojn de EEU.

1. Ellaboro de 3-5 novaj projektoj baze de konkursoj de Eŭropa Komisiono kaj transdono al la koncernaj fondaĵoj inter kiuj por Eŭropo por civitanoj kaj Erasmus+.
2. Organizo de la kunsidoj de la Asembleo de EEU dum la Itala Esperanto-Kongreso en Triesto fine de aŭgusto 2019 dum kiu oni prezentos raportojn kaj planojn kaj diskutos pri strategio de EEU.
3. Kunlaboro kun la membro de Eŭropa Komisiono V. Andriukaitis baze de la ĝisnuna bona komunikado kun li. Aparte pri la plano de EEU interesigi la komisionanon pri lernejoj Navracsics pri nia plano proponi enkondukon de Multlingva Akcelilo.
4. Realigo de aprobata projekto kadre de Eŭropaj fondaĵoj, se iu el niaj proponoj estos akceptita, aŭ projekto en kiu EEU estas nur partnero.
5. Preparo de eŭropa konferenco pri „Politiko pri multlingveco en eŭropaj lernejoj“ en Triesto en aŭgusto 2019.
6. Pluaktivi en Platformo por multlingvismo de Eŭropa Komisiono kune kun E@I.
7. Eldoni libron paperman pri la stato de Esperanto-movado en Eŭropa Unio kiel kolekto de 28 artikoloj pri la movadoj en 28 EU-landoj, kiujn ni aperigis en Eŭropa Bulteno inter 2010 kaj 2013 kaj kreis elektronikan formon de la libro troviĝanta en nia paĝaro.
8. Partopreno de EEU-representantoj en laŭeble multaj internaciaj neesperantistaj konferencoj kiuj traktas lingvajn kaj identecajn temojn.

9. Prelegoj kaj partopreno de la estraranoj de EEU en laŭeble multaj konferencoj kaj kongresoj de landaj asocioj de EEU al kiuj ili estos invititaj,
10. Stimulado de landaj asocioj prezenti proponon en siaj landoj por akiri statuson de nacia kultura heredaĵo por esperantaj kulturaj atingiĝoj en la koncernaj landoj kiel tion atingis la poloj. Aparte e-movadon en Litovio, Slovakio kaj Kroatio.
11. Iniciati agadojn far Landaj Asocioj kaj lokaj societoj okaze de Eŭropa Lingva Tago (26-a de septembro) kiel publikaj prelegoj, ekspozicioj, lingvaj festival(et)oj, aperigo de nacilingvaj libroj pri Esperanto kaj lingva problemoj kaj kiel propedeŭtika instrumento por lernejoj...
12. Kompletigadi la retan kurson de E per komuna baza lernilo por komencantoj en ĉiuj ligvoj de EU baze de la eltrovita fundamenta morfemlisto de la plej oftaj morfemoj en parole kaj skribe uzata Esperanto (esploroj de Z. Tišljar kaj R. Gerard) en la retejo [www.learn.esperanto.com](http://www.learn.esperanto.com).
13. Disvastigo de konkludoj de Eŭropa Platformo de Civitanasocioj por antaŭenigo de Multlingveco, per prelegoj kaj rondaj tabloj.
14. EEU-kunlaboro kun diversaj mondaj kaj eŭropaj organizaĵoj kiel UEA, TEJO, SAT, EDE, ILEI, AEK, AVE...
15. Redaktado kaj aperigado de Eŭropa Bulteno (11 numeroj sur averaĝe 12 paĝoj en elektronika formo kaj aperigata en nia EEU-paĝaro kaj paĝaro de Remush (<http://remush.be/bulteno/index.html>).
16. Regula kompletigado de informoj en la retpaĝaro de EEU [www.europo.eu](http://www.europo.eu)
17. Helpi realigon de la eŭrop-financata projekto Multlingva akcelilo kiu en fino de 2019 devas finrealiĝi kaj kie EEU estas asociita partnero. Nia sekretario kiel fakulo kunordigos la pedagogian flankon de la projekto kaj pluraj esperantistoj helpos per tradukado, kreo de kantoj ktp.
18. Disvastigo kaj utiligo de rekomendoj de grava multidisciplina projekto „Movebleco kaj Inkluzivo en Multlingva Eŭropo“ (MIME) de Eŭropa Komisiono (2014-2018) prezentita en la dokumento „Vademecum de Movebleco kaj Inkluzivo en Multlingva Eŭropo“. Temas pri la unua grava kompleksa lingvo-politika de Eŭropa Komisiono pri serĉado de solvoj de lingva komunikado kaj lingvaj politikoj en Eŭropa Unio. Libere akirebla en PDF formato je retpaĝo: <http://www.mime-project.org/vademecum/>
19. Organizati 2 estrarkunsidojn kaj konstantan elektronan komunikadon inter la estraranoj.

## PRELEGOJ DE LA PREZIDANTO DE EEU



En septembro kaj oktobro la prezidanto de EEU, D-ro Seán Ó Riain, prelegis en du poliglotaj renkontiĝoj de poliglotoj, en Bratislavo kaj en Ljubljano. En Bratislavo la 29-an de septembro li prelegis dum unu horo pri la irlanda lingvo, kaj pri la lernfaciligaj ecoj de Esperanto, kiuj povus antaŭenigi ties lernadon. Krome li donis kvar duonhorajn lecionojn de la irlanda lingvo por komencantoj. La salonoj plenis.

En Ljubljano la 27-an de oktobro li prelegis al 400 homoj pri la projekto Multlingva Akcelilo kaj pri ebla helpo kiun povus doni tiu projekto al la lernado de la irlanda lingvo.

En ambaŭ lokoj la utileco de mallongaj kursoj bazitaj je la plej ofte uzataj morfemoj kaj baza gramatiko de Esperanto, la laboro de Zlatko Tišljar kaj la Zagreba Metodo, estis substrekitaj.

Seán Ó Riain

## REZOLUCIO DE EP PRI (LINGVAJ) MINORITATOJ

Mi volas atentigi vin pri nova [rezolucio de la Eŭropa Parlamento](#) pri (lingvaj) minoritatoj, kiun oni votis la 13an de novembro, kiu enhavas ankaŭ artikolojn pri lingva egaleco en EU. Ni ĉiuj scias, ke la Komisiono ofte ne respektas lingvajn rajtojn, eĉ pri la oficialaj lingvoj *La Eŭropa Parlamento petas la Komisionon kaj la ŝtatojn-membrojn ekagi por forigi administrajn kaj financajn obstaklojn kiuj povus bari la lingvan diversecon je eŭropa kaj nacia niveloj kaj helpi la uzon kaj efektivigon de lingvaj rajtoj de personoj kiuj apartenas al etnaj minoritatoj; spronas ŝtatojn-membrojn ĉesigi lingvajn diskriminaciajn praktikojn. (La Eŭropa Parlamento "Encourages the Commission and the Member States to take action to remove administrative and financial obstacles that could hinder linguistic diversity at European and national level and impede the enjoyment and implementation of the language rights of persons belonging to national and ethnic minorities; urges the Member States to put an end to linguistically discriminatory practices;")*

Ĉu UEA kaj EEU eble povus pripensi kampanjon por ke la Komisiono pli efike respektu la rajtojn de la civitanoj?

Michele Gazzola

## KAEST FESTIS SIAN 40-JARIĜON



La 19a KAEST (Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) okazis de la 18a ĝis la 21a de oktobro 2018 en urbeto Modra-Harmónia, Slovakio. Ĝi estas ekde 2010 jam la kvina konferenco, kiun organizis E@I (Edukado@Interreto), neregistara asocio baziĝinta en Slovakio. Dum 2018 oni tamen

festas datrevenon, ĉar KAEST estis kreita antaŭ 40 jaroj: ĝin unuafoje okazigis la scienc-teknika sekcio de ĉeĥoslovakaj esperantistoj en la jaro 1978.

Ĉi-jare partoprenis 69 homoj el 13 landoj (vidu ĉi-sube detalan grafikaĵon) por aŭskulti pli ol 30 prelegojn **pri evoluo de paradigmoj en scienco kaj tekniko** (kio estis la ĉeftemo de la ĉi-jara konferenco), aŭ pri aliaj temoj kiel biologio, astronomio, lingvistiko, kulturo. Unuafoje en KAEST, pluraj prelegoj estis filmitaj kaj rekte enrete elsendataj (nun ili estas libere videblaj en la Youtube-kanalo "11pably"). Tion ni dankas ĉefe al filmisto Pavol Kaščák kaj la malavara subteno de ESF. Tiuj filmitaj prelegoj ankaŭ troveblas pere de la retejo de KAEST 2018 ([kaest2018.ikso.net](http://kaest2018.ikso.net)). La « neĉeftemajn » prelegojn oni filmis ankaŭ, sed tiuj bezonas ankoraŭ teknikan prilaboron kaj aperos en la jutubo pli poste.

Krome okazis aldonaj ludaj programeroj: dum la unua vespero interkonaj ludoj estis proponitaj por volontuloj, kaj dum la aranĝo eblis ankaŭ provi la ludon "Paŝklaku", danctapiŝan seriozan ludeton kiun kreis Kryštof Klestil dum sia volontulado ĉe E@I kadre de Eŭropa Volontula Servo. Charlotte Scherping Larsson kaj Sasha Murr siaflanke prezentis "Tiel La Viv'", seriozan rolludon, kies celo estas konsciigadi pri malhelpoj kiujn povas renkonti diversgrupaj homoj kiaj ekzemple samseksemaj, fremdaj aŭ handikapitaj homoj dum sia vivo.

Inter aliaj ekster-prelegejaj programeroj okazis ankaŭ vingustumado dum vendreda vespero kaj agrabla suna ekskurso al kastelo Červený Kameň dimanĉe posttagmeze. Dum la aranĝo funkciadis samtempe libroservo kaj "lib(e)ra interŝanĝo" por homoj, kiuj ŝatas donaci siajn superflujajn librojn anstataŭ lasi ilin sur breto.

Aldona pluso de la evento: la prelegoj de KAEST (kiel jam kutime) aperos ankaŭ libroforme, en la prelegkolekto, kiu estas preparata por eldono printempe 2019. Venontfoje, ĉiuj estas kore invitataj por denova festa jaro dum la 20a KAEST, en oktobro 2020!

Salomé Hug, EVS-volontulo en E@I

## 110 JAROJ DE ESPERANTO EN KROATIO



La 2-an de novembro 2018 kroataj esperantistoj solenis en Zagreba Pupteatro sian 110-jariĝon. Nome en 1908 fondiĝis en Zagrebo Kroata Esperanto-Societo kiun oni konsideras unua tutkroata Esperanto-organizo, kvankam unua E-grupo fondiĝis unu jaron pli frue en Rijeka.

La solenaĵo estis digna. Antaŭ ĉirkaŭ 150 personoj estis prezentita simpatia programo kiun gvidis Đivo Pulitika, prezidanto de Kroata E-Junulara Asocio kaj Ankica Jagnjić, membro de la estraro de Kroata E-Ligo. Oni prezentis la historion per fotoj de la plej signifaj esperantistoj dum tiu periodo (la sinsekvon de la fotoj vi povas vidi en la paĝaro de KEL [www.esperanto.hr](http://www.esperanto.hr)).

Inter la fotoj unuopaj kantistoj kantis kantojn en Esperanto kaj la kantkoruso de makedonaninoj en Zagrebo Ezerke inter kiuj pluraj estas esperantistinoj. Fine okazis regalo kun manĝaĵoj kaj trinkaĵoj kaj la multaj esperantistoj inter kiuj pluraj kiuj jam de longe ne kontaktis la Ligon interbabilis kaj relumigis siajn memorojn.

Pri la jubileo interesiĝis gravaj informrimedoj: du ĉefaj televidstacioj elsendis intervjuojn kun Spomenka Štimec, nuna prezidantino de KEL kaj Judita Rey (ĉiu po 10 minutoj), nuna vicprezidantino, tria loka stacio elsendis intervjuon kun dro Vidović, Kroata radio (elsendo por eksterlando) intervjuis Ankica Jagnjić, Spomenka Štimec kaj Zlatko Tišljar kaj pluraj gazetoj aperigis artikolojn kaj artikoletojn

Zlatko Tišljar

## 100 JAROJ POST LA FINO DE LA GRANDA MILITO

Ni memoras. Antaŭ pli ol 100 jaroj, mia avino Flore Vervoort staris antaŭ la muro de sia farmobieno kun tri junaj infanoj en la brakoj (mia patrino 4-jaraĝa, onklino 3-jaraĝa kaj la plej juna de unu jaro). Sed vidalvide de mia avino estis plotono de germanaj soldatoj, fusilo en la mano, al kiu la germana oficiro ordonis pafi! Kaŭzo? Flore rifuzis diri kie troviĝis mia avo (belga soldato kiu tiam kazerniĝis en neŭtrala Nederlando). Kun larmoj en la okuloj la junaj germanaj soldatoj rifuzis!

Poste, kun helpo de lokaj pastroj, mia avino sukcesis atingi mian avon en Nederlando, kaj pli poste fuĝi al Britio. En 1940 mia patrino rifuzis akompani la familianojn je fuĝo al Francio. Felice! Mi supozas ke ni ĉiuj povas rakonti similajn anekdotojn. Do ankaŭ ni, ni estis rifuĝintoj!

Ĉu militoj ĉesis? Bedaŭrinde ne! Ĉu ne plu estas rifuĝintoj? Bedaŭrinde ne! En la Eŭropa Bulteno 180 04/2018 mi raportis pri lingva festivalo en Oostende, pri la lingvoj de la migrantoj. Ĉar ne estis kutima prezentado de la kutimaj lingvoj, nia klubo La Konko (sekcio de Flandra Esperanto-Ligo) organizis antaŭe konferencon kun la iama belga ministro pri Kunlaboro kun la Sudo D-ro Réginald Moreels, ankaŭ iama prezidanto de Kuracistoj sen Limoj, pri 20 demandoj pri Migrado. Tio por prepari la publikon al nia Lingva festivalo.

Nun aperis ĉefartikolo de Frato Wilfried Meulemeester en la revuo Scheutnieuws [http://www.scheut.be/images/scheutnieuws/pdf/Scheutnieuws\\_2018\\_5.pdf](http://www.scheut.be/images/scheutnieuws/pdf/Scheutnieuws_2018_5.pdf), organo de la kongregacio de Scheut <http://www.scheut.be/>. Mia edzo Walter van den Kieboom kaj mi regule partoprenas en la Multkulturaj Diservoj, ĉiun duan sabaton de ĉiuj monatoj. Tie ni kantas kun la koruso Matondo (Dankeme en Kikongo) en multe da lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Wilfried Meulemeester estas Frato Misiisto de la kongregacio de Scheut. Li dum multaj jaroj laboris kiel misiisto en Kongo. Nun ĉe Jakoeboe li respondecas pri helpo per donacoj de nutraĵoj al la malriĉuloj de nia urbo Oostende (<https://pe-sint-pieter.be/jakoeboe>). Li kompilis la jenan artikolon, sekve al la nuna socia problemo de migrado.

Flory Witdoeck

## RISKI ENTREPRENADON

Dum la konferenco “Dudek demandoj pri migrado” de d-ro Réginald Moreels je la 9a de marto en Hazegraskerk, Ostendo, Hamid Hisari (antaŭe interkultura peranto ĉe CAW – Centro de ĝenerala bonfartiga laboro) faris rimarkindan proponon. Li atentigis pri tio, ke multaj migrantoj, alvenantaj en Belgion, fakte estas viktimoj de la bildo pri Belgio/Eŭropo, prezentita al ili de senkonsciencaj homokontrabandistoj.

Oni asertas al elmigremuloj, ke Eŭropo, Anglio, estas por transmigrantoj la paradizo, kie restadpermeso, laboro, loĝigo kaj mono estas kvazaŭ donacotaj. Ofte iliaj familioj multe investis por ebligi la vojaĝon, aŭ ili mem por tio vendis siajn domon kaj posedaĵojn. Alveninte ĉi tie ili vidas sian migran planon fiaski, kaj ili ekvivas en neenviindaj cirkonstancoj. Tiam reiro al la devenlando ne eblas, ili ne plu posedas ion ajn por

ekkonstrui estontecon, kaj ili ne plu kuraĝas aperi antaŭ la familianoj, kiuj foroferis multon por ili.

Por preventi tiajn dramojn Hamid proponas honeste informi la migremulojn en ilia hejmlando pri la situacio en Eŭropo: kion ili rajtas esperi tie koncerne restadpermeson, laboron, socialan asekuron, la Konvencion de Ĝenevo kaj la rajton apelacii al ĝi. Tio ankaŭ pensigas min pri la artikolo de Laurent Kadiebwé, antaŭa estrarano de la a.s.p. Jakoeboe — Welzijnsschakel Vluchtelingen en Ostendo, nun profesoro ĉe Institut Supérieur de Développement Rural en Tshibashi en Kananga kaj ĉefdirektoro de ISDR-Demba; D.R. Kongo. Antaŭ pli ol dek jaroj okaze de la vizito de ŝtatestro Joseph Kabila en Belgio li verkis artikolon, kiu tiutempe estis ne tre atentita, sed ankoraŭ nun povas iel inspiri la migradopolitikon.

### **Kontraŭflue informi kaj laŭflue akompani:**

Kadiebwé opinias: “Belgio ne havu nur subpreman politikon kontraŭ fremduloj kaj rifuĝintoj, precipe kontraŭ Konganoj. La lando profitus per ĉiu inteligento, kiun ĝi havas, per ĉiuj rimedoj, kiujn ĝi disponas, starigon de pli preventa kaj humana migropolitiko.” Li daŭrigas: “Devus eble, helpate de konganoj, kiuj volonte reiras al sia patrio, informi en Kongo migremulojn pri la realoj de la vivo en Belgio. Tiuj realoj povus esti temo, pri kiu eblas paroli kun grupoj de junaj migremuloj, oficistoj, universitatanoj kaj mezklasuloj generale. Ĉu tiamaniere ne eblus eviti multajn bedaŭrojn kaj dolorajn elreviĝojn?”



“Tiu kontraŭflua informado kompletigeblas per laŭflua akompanado. Multaj konganoj, loĝantaj en Belgio, ja volus reiri al Kongo, se tio povus okazi en digno. Por tio eblas serĉi manierojn kaj eblojn, per kiuj la homa digno estas respektata. Ĉu doni ŝancon al tiuj homoj ekonomie, sociale kaj

politike edukiĝi ne estus garantio por sukcesa reintegrigo en ilia hejmlando?

“Tiuj migrantoj povus kontribui al daŭra solvo de la konkretaj kaj vivnecesaj problemoj de Kongo.” (La plena artikolo nederlande legeblas en Uitepers, n-o 51 de marto 2004)

Mi antaŭ nelonge aŭdis pledojn de Chris De Stoop kaj Samira Attilah en la tetevida prezentaĵo “De Zevende Dag” por akceptocentro kun ripozejo kaj psikologia akompanado kaj ĝusta informado pri la eblo peti azilon aŭ reiro al la hejmlando kun orientado al perspektivo por la estonteco... En Nederlando tia formulo rezultis 70 procentajn azilpetojn kaj 20 procentajn reirojn kun akompanado. Entute tio kostis sesonon de subpremadaj kostoj.

Ankaŭ d-ro Réginald Moreels publikigis en MO je la 19a de septembro 2018 artikolon pri neleĝa restado kaj migrado: “Pledo por alia traktado de migrado”. “La traktado de migrado en nia lando iĝas ĉiam pli subprema. La loĝantaro ekhavas la impreson, ke ni ĉiuj fremdiĝas. Ĉiuj nunaj decidoj estas nur duonefikaj. La migra fenomeno estas malnovega, malsimpla, tutmonda, kaj ni ne trovas daŭrigeblan solvon por kunigi gastemon kun la elasteco de nia loĝantaro”.

D-ro Moreels opinias ke alia strategio estas necesa, kaj tial li proponas socian eksperimenton. Lia elirpunkto estas, ke neleĝeco estas kvazaŭ pesto por la migrantoj persone kaj por la socio. Nova laŭgrada strategio necesas por aperigi novvenintojn el la kaŝitaj anguloj de la socio.

En unua fazo li volas labori super socia karto pri nia nuna akcepta politiko por akiri komprenon, kiu laŭeble plej multe preventas neleĝecon kaj malliberigon. En interkonsulta fazo li volas esplori, kiel migranto, azilpetanto, sendokumentulo, transmigranto dum la atendotempo povas esti utiligata en taŭga projekto. Sekvas eksperimenta ekzekuta fazo kun deviga lingva kurso, integriĝa kurso kun espero de estontecperspektivo kun ebloj laŭleĝe restadi en nia lando, plumigri aŭ reiri al la hejmlando kun kuraĝiga monhelpo por evoluigaj projektoj aŭ ekentreprenejoj. Tio jam okazas, sed nur por azilpetantoj.

Per valortaksaj fazoj oni alproksimiĝas al politikaj decidoj kaj alĝustigo de la leĝdonado pri migrado. Ĉiuj tiuj fazoj povas esti fintraktataj de informa centro. Aparte interesa estas lia lasta propono transformi la tiel nomatajn konfliktejojn en la mediteranea regiono en “migrantinformajn oficejojn” kun forta teamo, kie la migremuloj povas anonci sin. Réginald Moreels jene finas sian artikolon: “Tiuj proponoj ŝajnas en la nuna agresa kaj subprema etoso iom nerealismaj, sed ni staras antaŭ socia klimatsanĝiĝo miaopinie neinversebla, sed ankaŭ esperiga.”

Jen defio: Hamid, Laurent, Cris, Samira, Réginald... riskas entrepreni ion. Ili pledas por konstrua traktado de migrado kun la risko esti konsiderataj kiel nerealismaj revuloj. Ne havu iluzion: la migrada fenomeno estas io tre malsimpla. Tial 11.11.11 (flandra kupola organizado de pli ol 60 Ne-Registradaj Organizoj); en sia ĉi-jara kampanjo ree petas ekstrakti la strukturajn kaŭzojn de la devigata migrado. La manko de elektebloj, kiuj limigu la klimatproblemojn, la multaj militoj, ĉe kiuj estas malmulta atento al penoj por limigi la konfliktojn, financ-ekonomia politiko, kiu devigas homojn esti rifuĝanto.... Ĉu plia defio al ni? Kiel ni povas mem pli konstrue cerbumi kaj paroli pri migrado? Kiel ni, kiel CICM / Misiistoj de Scheut povas kontribui en la socia debato, en la gazetaro kaj en la politiko por pliigi la inspiradon al tia politiko pri migrado?

Wilfried Meulemeester

La artikolo “Kontraŭflue informi kaj laŭflue akompani” de Laurent Kadiebwe nederlande legeblas ĉe [http://www.uitpers.be/BUP/archief/artikel\\_view.php?id=724](http://www.uitpers.be/BUP/archief/artikel_view.php?id=724)

La artikolo “Pledo por alia ekstrakto de migrado” de Réginald Moreels facile troveblas per Google tajpante: clandestiniteit-een-pest-voor-mens-en-maatschappij?

## **LISTIGU E-KURSOJN EN LERNEJOJ EN EDUKADO.NET**

En februaro 2017 la Franca Ministerio pri Edukado oficiale sciigis apartan komisionon de Esperanto-Francio, ke eksperimenta Esperanto-instruado povas jam ekokazi, kie lernejestroj bonvolos (legu raporton pri la agado en la revuo *Esperanto*, junio 2017, p. 143). Notinde estas, ke post maksimume kvinjara taksado la ministerio pripensos plivastigi la enkondukon de nia komuna lingvo en la francan edukadan sistemon, se sufiĉe da gelernantoj kaj instruistoj



montriĝos interesataj lerni kaj instrui. Kompreneble, endas sukcesigi tian (eble) decidigan okazon por nia movado!

Sekve, ekde septembro 2017, Esperanto estis enkondukita en 13 lernejojn, bazajn aŭ mezajn kaj instruita al 266 gelernantoj. Resulte, jam fine de la lernejo-jaro 2018 kelkaj komunikaĵoj okazis inter lernejoj de malsamaj landoj. Tamen, la franca ministerio informis nin ke tio «ne sufiĉas»: do, tiuj nombroj devas plialtiĝi. Tial, por kuraĝigi pli da lernejestro(in)j, geinstruistoj kaj gelernantoj partopreni la eksperimenton, estus ege alloge, ke ni povu pruvi ke Esperanto estas instruata ankaŭ en kiel eble plej multaj lernejoj kaj landoj. Ju pli tio eblos des pli tia eksperimento iĝos altira, ne nur en Francio sed, espereble, ankaŭ en Eŭropo. Tiucele estas lanĉita grava alvoko, por ke ĉiu Esperanto-instruanto/isto en eŭropaj lernejoj enskribiĝu en la nura oficiala listo kaj mapo disponeblaj ĉe Edukado.net. La ĝisdatigon de tiu listo eblas fari ĉe: <http://edukado.net/kursejo>.

La franca komisiono «Esperanto-ĉe-abituro»: Alexandre André, Guy Camy, Maurice Jux

## PROpono POR NOVA SLOGANO EN EU



La 11-a de novembro 2018, estas la centa datreveno de la subskribo de armistico de la unua mondmilito. Tiu armistico ĉesigis la buĉadon inter eŭropanoj, kiu daŭris dum 4 jaroj.

Nun, ni adoptu la frapfrazon:

Estu malbenata la milito kaj per Esperanto daŭrigu la konstruon de Eŭropa Unio.

Colette kaj André Weiss

## INTERESA FOTO

Ĉi tiu foto tamen ne estas ŝerco. Ĝi estis fotita dum la partolado de sinjorino Angela Merkel en Hotelo Esperanto en germana urbo Fulda. Do, sufiĉe bona reklamo por Esperanto, ĉar ĝi aperis multloke.



**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de novembro 2018

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Salomé Huglatko Tišljár, Seán Ó Riain, Flory Witdoeck. Wilfried Meulemeester, Colette kaj André Weiss, Michele Gazzola, Alexandre André, Guy Camy, Maurice Jux

Kontakto: ztislar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

